

# KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO □ OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO  
SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO

12. strato Gracia. — SABADELL  
BARCELONA-HISPANUJO

**AVIZO:** La Redakcio konservas al si la rajton korekti laŭ bezone la manuskriptojn. Neakceptitajn manuskriptojn oni ne resendas.

**ENHAVO:** Por la ne federaciaĵoj. — Flugadoj. — El Valencio: Esperanto Praktika. — Enketo. — Pri la kaj *tiu*. — Studkomisio pri ĉiulanda verkaro. — 1<sup>a</sup> Kongreso de Universala Esperanto-Asocio. — Enlanda Movado. — Oficiala parto. — Korespondado.

## POR LA NE FEDERACIANOJ

**N**I konstatas ke en plejmultaj landoj, la ĵus naskiĝintaj grupoj baldaŭe starigas «ĝeneralan societon» por plej efike propagandi kaj disvastigi la internacian lingvon, kaj la grupoj ĉiuj grandigas ĉirkaŭ la ĉefa societo kvazaŭ idoj ĉirkaŭ ilia patrino.

Ĉe ni, en Katalunlando, okazis tute malsame. Kaj ja estas interesindaj la diversaj kialoj, kiuj kaŭzis tian fakton. El ili ni nur intencas preparoli pri unu, pri tiu, kiu niaj kontraŭuloj juĝas la ĉefan.

Kaj tio ne estas fantaziaĵo. Ĉiuj, kiuj kun ni daŭrigis la klopodojn kaj entreprenojn por atingi la kreon de «K. E. F.» sciigis kiel ni mem, pri tiaj kialoj, kaj almenaŭ ilin povis suspekti ĉe iuj.

La ĉefa motivo de niaj kontraŭbatalantoj estas en tio, ke ni ne rajtas krei Federacion de geesperantistoj katalune parolantaj, pro unu gravega kaŭzo: pro tio, ke en la Hispana Ŝtato—kies Katalunlando estas parto—ekzistis jam de longe Societo kiu prenis sur sin celon similan al la nia. Vane ni kontraŭdiris ke Esperanto respektas kaj firmigas ĉiujn naturajn lingvojn; vane ni asertis ke Boulogna kongresa deklaro certigas nian rajton; vane ni citis ke, en aliaj Ŝtatoj similaj al la nia ekzistas ankaŭ prilingvaj societoj eĉ regionaj Federacioj; vane ni klarigis per ĉiuj konvinkigaj argumentoj niajn alsopirojn.

Spite ĉio kaj ĉiuj, niaj malmultenombraj kontraŭuloj ne konvinkigis kaj daŭrigis sian vojon kontraŭ ni.

Feliĉe antaŭ longe iuj komprenis la veron kaj la veran sencon de la cititaj tialoj, kaj ili kuniĝis ĝoje al ni. Niaflanke ni ilin akceptis kiel fratojn, kiel verajn samideanojn ne hontigantajn pro ilia iama malpravo. Ili sin montris bonaj, bonkoraj kaj pripensemaj, kaj estas tre laŭdinda la agado de tiuj, kiuj konfesas sian malpravecon kaj fakte elpravas esti erarintaj.

Nin kredu: nia akcepto ne estas tia: tio estas aliĝo, tute natura. Ni fidas tiom — iajn fojojn eĉ plie — al tiuj, kiuj konfesas sian erarecon kaj al ni alkuniĝas, kiom al tiuj, kiuj propramove, eĉ fojon senpripense, kuniĝas tuje, ĉar tiuj ĉi ne ĉiam estas konvinkigintaj aliĝuloj.

Ĉar ni opinias esti pravaj, ĉar ni kredas ke iam niaj estantaj kontraŭuloj konvinkigis, ni prenis sur nin la jenan devizon:

La kontraŭulojn, konvinkigi.

La indiferentulojn, alvarbi.

Al samcelanoj, saluton.

Al ĉiuj, respekton.

Kaj tiu ĉi estos nia ĉiama devizo, ĉar ni unike celas unuigi, kunigi: ni volas kunigi fortojn por ke la tutaĵo estu potenca kaj multepova. Kaj estas nia opinio ke la tempo kaj klopodoj de ni uzataj por kontraŭbatali por mallaŭdi sen ia fundamento aŭ grava intereso, samideanojn t. e. esperantistoj, taŭgos plej bone por alvarbi novsamcelanojn.

Ni difinas jene nian agadon: unue klopodi por la loka grupo: baldaŭposte por «K. E. F.» kaj fine por universalaj societoj aŭ por privataj celoj: t. e., laŭ natura ordo. Ni unue donu niajn entuziasmon kaj agemecon al la enlanda ĝenerala movado por igi ĝin plej forta kaj vasta kiel eble; la ceterajn entuziasmon kaj agemecon ni donu al internacia movado, kiu ja ankaŭ ilin bezonas. Vi rimarku ke ju pli enradikiĝos la Esperanta sento en nia lando, ju pli ni fortikigos Esperantisman ĉe ni, des pli forta kaj vasta kreskos kaj enradikiĝos la universalaj kaj privataj celoj. Kaj estos aberacio kredi ke ni intencas nei nian kunhelpon al tiuj ĉi lastaj entreprenoj. Male; ni konsideras utilan ilian ekzistadon kaj celon, kaj ni devas ilin kunhelpi laŭ la apartaj inklinoj aŭ sentoj. Kiu povas po unu doni, tiu ĝin donu: kiu povas doni po cent, tiu ĝin donu: kiu povas kunhelpi krom la enlandan movadon la eksterlandan tiu ĝin kunhelpu. Sed tiu esperantisto kiu unike povas kunhelpi la enlandan ne decas kunhelpi la alilandan malgraŭ ĝi estu internacia.

Ĉu pro egoismo? Tute ne, samideanoj, sed pro natura sento. La

kunhelpo liverita al neenlanda societo helpos malmultege la enlandan movadon, kaj konsekvence malrapidigos la alvarbadon de novaj samideanoj; sed ja utilos por la difinita celo la kunhelpado al la enlanda societo.

Se ĉiuj katalunoj estus antaŭ nune same opiniante, kredeble nia «K. E. F.» estus efektiviĝinte antaŭ multe, kaj ĝi estus plej prospera. Ni sciu ĝin kompreni!



## FLUGADOJ

**K**IEL eble plej baldaŭ mi superflugas pro laceco de homaj aferoj. Des pli bone, se mi aerflugante altegen, flirtante horizonton povus suĉeti ambrozion de ripozo. Ĉiam ripozas mi, kiam ludas kun kamparaj feinoj, per mia forteco pli ol per la vento, ĉifitaj malkviete, siaj senkolornubaj ventaĵoj.

Mi honte agus tiel, se miaj manoj maldiskrete tuŝus mortantan virgulinon.

Kompreneble, la feinoj disvolviĝas tiel facile! Siaj iluziaj korpoj nenial sangadultiĝas nur kuraĝas mi, ŝteli plenmanon da blondaj haroj por montri al naivulino, pruvon de feina ekzisto.

Ĝis mi la babilado de ĉiuj esperantistoj el diversnaciaj, alvenas tro varma de entuziasmo, kaj mia enspiro tiamaniere tro malfacile min devigas pli alten reflugi.....

Nedisiganta birdaro, kies trudema krio bruetas miajn orelojn, skuas mian tro lacan penson, kvazaŭ mi forvaloru ilian gravan kvaliton, bekbatas kaj ŝiras mian spiriton, ameme allogante min al kuseno de ĝia belega plumaro, dolĉa lanugo.

Tiamaniere oni min gvidas ĝis altaĵeto, la altaĵeto kien la naivulo X. de Maistre supreniris iun tagon kune kun aminda Rozalio. En ĝi nun, mi rigardas belan Vik'aninon, Margarido'n Orriols, novan edzinon de nia Johano Cunill kasisto el *Vika Esperantistaro*.

Je verda helega naturo, miriĝas la geedzoj; ĝis ama drinkado reciproke ili amuziĝas.

Dume, aperante la kvinpinta stelo super iliaj kapoj, en iliajn vizaĵojn resendas feliĉegon de senmakula espero.

Via dinamiko estas amo, nur amo pura, viva, ne interesa amo.

F. SURROCA

EL VALENCIOESPERANTO PRAKTIKA

ESPERANTOLERNADO - AMKORESPONDADO - GEEDZIĜO

## I

**A**NTAŭ du jaroj Sinjoro Emilio Baez estis nia kunlernanto kaj kungrupano ĉe la Valencia Grupo Esperantista. Li, same kiel ĉiuj preskaŭaj esperantistoj, ankoraŭ lernante nian sukcesplenan lingvon, komencis la multpraktikan korespondadon esperantan ĉiulanden per poŝtkartoj. Inter siaj gekorespondantoj, li ĉiam, de la komenco, plej-tentis lertan belganinon nomatan Blanche Guillier. Ĉiam en liaj oreloj sonis tiu nomo; ĉiam antaŭ liaj okuloj elsaltis ŝia portreto. Sendube ĉe la belganino ankaŭ okazis same rilate al li, ĉar post kelkdeko da interŝanĝitaj postkartoj

*Ekamis la konato  
Kaj reciproke ŝi...*

## II

En Februaro de 1909, li veturis Bruselon, urbo de la fianĉino, kien li alvenis, ĉiam gvidata kaj helpata de la *esperplena verda stelo*, kiu neniam forlasas.

Dum la vojo li estis ĝoje kaj bonvene akceptata kaj helpata de la gesamideanoj, kiujn li renkontis traveture.

En Bruselo oni lin akceptas per malfermitaj brakoj en la stacidomo.

*...Kaj niaj geamatoj  
Jam estas kor' ĉe kor'*

## III

De tiam li loĝas en Bruselo

*Kaj per solena beno  
De l'pastro ĉe la Fin'*

La pasintan 2<sup>an</sup> de Aprilo 1910<sup>a</sup>, la lerta brusela esperantistino Blanche Guillier kaj nia iama valencia kungrupano Sinjoro Emilio

Baĉz geedziĝis meze de ĝenerala ĝojo, bondeziroj kaj laŭdoj al Esperanto nura komprenigilo por tiu transcenda fakto de la homa vivo, kaj de tiam

*En ĉarma harmonio  
Ekvivas edz'edzin'  
Najbaroj kun envio  
Rigardas lin kaj ŝin.*

Nian gratulon al novaj geedziĝintoj!

Vi, karaj geedzamikoj, ne forgesu nin, kaj se ankoraŭ restas en la mondo iu, kiu dubas pri la praktika eco de Esperanto prezentu Vin antaŭ lin!

NOVEJARQUE (ANĜELO)

Valencio, Majo 1910.



## ENKETO

EN Maja numero de KATALUNA ESPERANTISTO, nia samideano Sro. D. Dalmau malfermas enketon invitante al ĉiu esprimi lian opinion pri tiu gramatika temo: «Diferenco (gramatika) inter artikolo kaj adjektivo». Mi bonvole partoprenos en la diskutado pri ĝi, kunlaborante per mia modesta opinio al ĝia klarigado.

Antaŭ ĉio, nepran rimarkon: laŭ opinio de Sro. Dalmau, artikolo estas gramatike samvalora ol adjektivo kaj por elpruvi tiun samecon li anstataŭigas la artikolon en la frazo «La homo kiu estas tie» per la montra pronomo «tiu» la frazo restante samsenca. Tial do, por bone kaj pli klare pritrakti tiun aferon mi konsideros du parte onigita la temon, tiel: 1.<sup>a</sup> Diferenco inter artikolo kaj adjektivo; 2.<sup>a</sup> Anstataŭebleco inter artikolo kaj montra pronomo.

*Diferenco inter artikolo kaj adjektivo.* — Kontraŭe al la opinio de la iniciinto de tiu ĉi diskutado, al mi ŝajnas tre malsamaj la artikolo kaj la adjektivo: adjektivo kvalitas la substantivon; artikolo difinas ĝin; tiu esprimas kondiĉojn, cirkonstancojn kiuj kunestas kun la substantivo; tiu ĉi montras nur rilaton inter ĝi kaj la persono al kiu ni parolas. Se ia ajn substantivo perdas kvaliton aŭ atingas ian novan, nepre tiu substantivo suferis ŝanĝon, sed tiu sama substantivo povas esti difinita aŭ nedifinita nenion ŝanĝante en ĝi, ĉar tiu ĉi cirkonstanco estas tute sendependa de ĝia esenco (substantivo) kaj de ĝiaj kvalitoj (adjektivoj) nur dependante de la persono al kiu ni pri ĝi parolas. Kon-

klude: la ideo esprimita de adjektivo estas *objektiva* kaj tiu esprimita de artikolo estas *subjektiva*: estas do grava diferenco inter ili.

*Anstataŭebleco inter artikolo kaj montra pronomo.*—Se oni uzas artikolon por difini, por montri la substantivon, kaj la montra pronomo taŭgas al tio sama, kompreneble ili estos kelkajn fojojn anstataŭeblaj; tamen ekzistas inter ili ia diferenco.

Artikolo nur difinas substantivon; montra pronomo krom difini ĝin pli precize ankaŭ reprezentas ĝin. Tial, ia ajn montra pronomo valoras substantivon difinitan de artikolo kaj estas ĝenerale uzata por eviti ripetado de vortoj, ekzemple: «La birdoj estis sur arbo, *tiu* kiuj forflugis, sin savis, la aliaj estis mortigitaj» la montra pronomo *tiu* same valoras ol la difinita substantivo *la birdoj* kaj ĝin reprezentas en la dua parto de l' frazo; neniam estas eble forigi substantivon kaj lasi nur artikolon ĉar tiu ĉi sola nenion signifas.

Kelkajn fojojn oni uzas montran pronomon difinante substantivon, ĉar tiu ĉi estas pli konkrete difinita de kondiĉoj antaŭe esprimitaj kaj nesufiĉe montreblaj per artikolo, ekzemple: «Ekzistas personoj kiuj ĉiam estas gajaj kaj scias gajigi la aliajn per sia simpatia bablado, *tiu* personoj plaĉas al mi.» En tiu ĉi frazo la montra pronomo *tiu* (difinanta la substantivon *personoj*) enhavas la signifon: *pri kiuj mi antaŭe parolis*, neesprimebla per simpla artikolo. Sed se tiu aŭ *tiu* kondiĉoj estas esprimotaj tuj post la substantivo, en tiu ĉi okazo oni povas uzi ĉu montran pronomon ĉu artikolon, ekzemple: «*tiu* personoj, kiuj ĉiam estas gajaj k. t. p. plaĉas al mi» aŭ «*la* personoj kiuj ĉiam k. t. p. plaĉas al mi». En tiu ĉi frazo kiel en la ekzemplo de Sro. Dalmau (kiu plenumas la antaŭdiritan kondiĉon) artikolo kaj montra pronomo estas anstataŭeblaj.

Jen mia opinio pri tiu interesa gramatika afero; mi tre deziras vidi opiniojn de aliaj samideanoj kaj precipe respondon de Sro. Dalmau, en la espero ke tiu ĉi enketo atingos la maloftan finon de interkonsento inter ĉiuj la partoprenantoj.

Sabadell'

A. LAGARRIGA



★ ★ ★

## PRI LA KAJ TIU

**E**N la maja numero de KATALUNA ESPERANTISTO mi legis enketon pri tiu afero, kaj kredante ke mi povus diri ion pri tio, mi sendas ĉi tiujn liniojn.

Al vi, Sro. Dalmau, de tiu momento respektinda amiko, mi petas bonvolecon, kaj ankaŭ al ĉiuj legantoj.

—*Artikolo.* Katalune artikolo faras la sekvantajn servojn: montras substantivon, determinas, aŭ nedeterminas ĝin, montras ĝian sekson, kaj fine ĝian nombron.

En la lingvoj kiuj ne havas artikolon, kiel la latina, la substantivo mem anstataŭas ĉiujn servojn de la artikolo, kaj la senco de la propozicio anstataŭas ĝian determinecon aŭ nedeterminecon.

En Esperanto la artikolo nur servas por determini la substantivon, ĉar ne ekzistas nedetermina artikolo, kaj ĉiuj aliaj servoj al si faras la substantivo mem. Se oni volas, eĉ la determinan artikolon oni povas forigi, restante la senco de la propozicio por konprenigi la determinecon aŭ nedeterminecon de la substantivo.

Ĝeneralgramatike artikolo estas konsiderata kiel vorto kiu servas por limigi la amplekson de la substantivo, kiam la artikolo estas determina; aŭ por doni vagecon al la amplekso de la substantivo, kiam la artikolo estas nedetermina. La artikolo determinas aŭ nedeterminas la substantivon, neniam kvalitas ĝin. La determinado de la substantivo ne estas kvalitado: la determinado ne aldonas kvaliton: simple precizigas, difinas la etendon, la amplekson de la substantivo, kiu estas ricevonta la kvalitado de la adjektivo. La artikolo ne aldonas novan ideon al la substantivo: montras nek esencon nek akcidenton de la substantivo, nur montras manieron kiel ni rigardas la substantivon, aŭ kiel ĉi tiu prezentigas al nia konsidero; estas pro tio ke gramatikuloj enigis la artikolon en la grupon de *Idealaj vortoj* (Bardina).

Estas strange al ni ke la artikolo Esperante ne konformiĝu sekse, nombre kaj kaze kun la substantivo (katalune konformiĝas sekse kaj nombre); sed la logiko aprobas ĝin: oni povus konsideri la artikolon kiel simplan determinan prefikson.

Katalune kaj alilingve la artikolo prenas sur sin elementojn aŭ asignojn de la substantivo, kaj estas tre logika ke en la aferoj komunaj ili konformiĝu.

—Kio estas *tiu*? *Tiu* iafoje estas vera determina artikolo, kiel en la ekzemplo de Sro. Dalmau, aliaj estas vera demonstrativa pronomo, kaj multaj estas korelativa pronomo: pro tio la gramatikuloj enmetis ĝin en la grupon *Artikolo-pronomoj*.

Estas kompreneble ke kiam oni uzas *tiu* kiel artikolo, ĝi devus esti neŝanĝebla aŭ nekonformiĝebla, kaj kiam ĝi estas pronomo, necesege devas esti konformiĝebla: estas pro tiu malfacilaĵo ke ĉiam oni uzos tian vorton kiel varieblan vorton.

Mi konkludas ke nek *la* nek *tiu* povas, laŭ mia senvalora opinio, esti konsiderataj kiel adjektivoj.

J. B kaj F.

Moncada, 1910<sup>an</sup> majon.



## STUDKOMISIO PRI ĈIULANDA VERKARO<sup>1</sup>

### KATALUNUJO

*Rimarkoj* de Sro. Fred. Pujulà pri *La Patrino*, tradukaĵo de sinjoro Alfonso Sabadell, lingvokomitato por kataluna lingvo.

Ne estis eble al mi klasigi la rimarkojn. Ofte en la sama frazo estas samtempe rimarkindaj kelkaj vortoj, la stilo kaj la tro libera traduko en okazo kiam laŭvorta traduko sufiĉas. Tamen mi klopodis kiel eble klasigi ilin laŭ vortoj kaj stilo.—Ŝajnis al mi necese, aldoni al la kritikitaj frazoj (Sab.), la originalan katalunan tekston (Orig.), kaj la, laŭ mia opinio, korektan aŭ pli ĝustan tradukon de tiu ĉi (Rap.). Mi devas konfesi kaj averti, ke tiu ĉi traduko nur celas la komprenigon de la kataluna teksto por la personoj, kiuj ne konas la katalunan lingvon, kaj ebligis la komparon kun la tradukaĵo de Sro. Sabadell.

Plej ofte en la originala kataluna teksto mankas la sintakso, kaj la leganto devas diveni aŭ supozi la sencon de la frazo per konjektoj. Mia celo ne estis do fari literaturan tradukon de frazoj, kiuj havas nenian literaturan kvaliton. Oni ne povas postuli de Esperanto tiajn miraklojn. Tial, sekve, mi ne precipe faras rimarkojn pri *La Patrino* kiel tradukaĵo sed kiel esperantaĵo. — LA RAPORTINTO.

AL en rekta komplemento.

Sabadell. . . — «la mizero ankaŭ al mi ne timigas». (52)

Originalo. . . — *a mi tampoc me fa por la miseria.*

Raportinto. — Ankaŭ min ne timigas la mizero.

1) Sro. Pujulà sendis al ni tiun-ĉi kritikon. Domaĝas ke ni ion rimarku pri ĝi, pro tio, ke ĝi estas serioza kaj serena. Se iu ajn ĝin ne juĝas tiel, kaj kontraŭe opinias, ne estas nia nek de nia amiko la kulpo, ĉar nur li estus kulpa se en tia kritiko estus ludinta rolon, simpatio; favoremeco, malsimpatio malfavoremeco, vidmanieroj, aŭ ia homa pasio.

Ni decidis ĝin publikigi pro tio, ke ĝi efike helpos la klasifikadon de la bonaj kaj malbonaj tradukaĵoj kaj tradukistoj; pro tio ke ĝi taŭgos por vidigi la aliandulojn ke nia kataluna literaturo ne estas tia, kia ĝin prezentas iuj tradukistoj, kaj pro tio, ke kiu nur kapablas marŝi, paŝo post paŝo, ne decas kuri.

Gajnos Esperanto kaj ni! — «K. E.»



Sab. — palpante al ŝi. (I44)  
 Orig. — *tocant-la*.  
 Rap. — tuŝante (aŭ palpante) ŝin.

AL, kiel prefikso.

Sab. — Alberto (aldonante karbkraĵonon al Manuelo). (I22)  
 Orig. — *Albert (donant carbó an en Manel)*.  
 Rap. — Alberto (donante karbkraĵonon al Manuelo).

Sab. — mi alvenas pro afero de granda intereso. (27)  
 Orig. — *vinc per assumpto de gran interès*.  
 Rap. — mi venas pro afero de granda intereso.

Sab. — Mi... kredu min... ne estus kuraĝinta vin alvenigi... sed... (38)  
 Orig. — *Jo... creguin-me... no'ls hauria gosat fer venir... però...*  
 Rap. — Mi... kredu min... ne estus kuraĝinta vin venigi... sed...

Sab. — Ĝustatempe ci alvenas, ĉar se ci ne estus alveninte, tiam mi estus irinta trovi cin. (55)  
 Orig. — *Arribes á punt, perquè si no arribes a venir jo t'hauria anat a buscar*.  
 Rap. — Ĝustatempe ci alvenas, ĉar se okaze ci ne estus veninta, mi estus irinta renkonti (aŭ serĉi) vin. (Rimarko pri «trovi».)

Sab. — Se mi ne estus alveninta vidi cin! (76)  
 Orig. — *Si jo no hagués vingut a veure-t!*  
 Rap. — Se mi ne estus veninta vidi cin! (aŭ pli ĝuste) renkonti vin!

Sab. — Oni alvenas viziti min. (94)  
 Orig. — *Me vénen a veure*  
 Rap. — Oni venas viziti min.

AMI.

Sab. — mi ne amas enuiĝi. (59)  
 Orig. — *no m'agrada amoinar-me*.  
 Rap. — mi ne ŝatas enuiĝi. (pli ĝuste) min ĝeni; aŭ priokupiĝi.

*Daŭrigos*



1<sup>A</sup> KONGRESODE UNIVERSALA ESPERANTO - ASOCIO

AUGSBURG (BAVARUJO)

28 Julio - Aŭgusto 1910

KARA SAMIDEANO,

**N**I havas la honoron inviti vin partopreni en la 1.<sup>a</sup> Kongreso de U. E. A. (por Eŭropo), kiu okazos en *Augsburg* (Bavarujo) de la 28<sup>a</sup> de Julio ĝis la 3<sup>a</sup> de Aŭgusto 1910.

La celo de tiu unua Kongreso de nia Asocio estas duobla: unuflanke interŝanĝi ideojn kaj projektojn pri la plivastigo de U. E. A. aŭdi pri ĝia nuna situacio, ĝiaj metodoj, ĝiaj principoj, fiksi la grandajn liniojn de ĝia laboro dum la venonta jaro, esprimi la bezonojn kaj dezirojn de la Esperantianoj laŭ kiuj la Komitato poste agados; aliflanke ebligi pli intiman konatiĝon kaj amikiĝon inter niaj ĉiuregionaj membroj, ilin elproksimigi dum kelkaj tagoj tiel ke ĉiu povu profiti la sperton de la alia kaj per tiu kunlaborado, kiun ebligas la dumkongresa kunvivado, pligrandiĝu la sento de solidareco inter Esperantianoj kaj la fervoreco pri U. E. A.

La urbo Augsburg kuŝas en la centro de Eŭropo; ĝi do estas facile alirebla por ĉiuj popoloj. Plie, krom la labora parto interesa kaj originala, la Kongreso prezentas ne kompareblajn allogaĵojn, kiuj solaj valoras la vojaĝon Augsburgon: vizito de la mondfamaj reĝaj kasteloj de Füssen-Neuschwanstein kaj, tuj post la Kongreso, ekskurso al Munĥeno, Oberammergau, kie okazas la tutmonde konataj Ludoj de la Kristusufarado (nur ĉiudekjare) kaj al Bavaraĵ Alpoj, en plej favoraj kaj certe neretroveblaj kondiĉoj.

La loka organizantaro fervore laboras por la aranĝo de la Kongreso kaj oni de nun povas esti certa pri gastema kaj samideana bonakcepto.

Dum la sama epoko okazos en Augsburg Kongresoj de *Germana Esperantista Asocio*, de *Tutmonda Esperanta Kuracista Asocio* kaj aliaj fakaj societoj.

Ni do esperas, Kara Samideano, ke vi bonvolos fari ĉion eblan por ĉeesti en tiu grava manifestado kaj sendi al ni *kiel eble plej rapide vian aliĝilon*.

La Komitato de U. E. A. : H. BOLINGBROKE, Mudie, Prezidanto.  
H. HODLER, Vic-Prezidanto, Administra fako.

Centra Oficejo de U. E. A. : 10, rue de la Bourse, GENÈVE.

GRAVA AVIZO. — La personoj, kiuj tute ne povas ĉeesti la Kongreso estas insiste petataj mendi *helpkongresan karton* po 1 Sm Tiu karto celas faciligi la financan aranĝon de la Kongreso; ĝi rajtigos al senpaga ricevado de la Kongresa Raportaro. Personoj, kiuj aliĝas kiel helpkongresanoj, povas ĉiam poste aliĝi kiel Kongresanoj, pagante 2 Sm plue.

## PROVIZORA PROGRAMO DE LA KONGRESO

*Honora Prezidanto:* Sro. WOLFRAM, ĉefurbestro de Augsburg

*Ĵaŭdon 28 Julio.* — 5 h., Solena Malferma Kunveno. — 7 h., Granda komuna festeno.

*Vendredon 29.* — 9 h. 1/2, 1<sup>a</sup> Labora Kunveno (pri Administra fako). — 3 h., 2<sup>a</sup> Labora kunveno (pri Financa fako). Vespere, Amuzaĵoj.

*Sabaton 30.* — 9 h. 1/2, 3<sup>a</sup> Labora kunveno (pri fakoj konsuloj kaj Esperanto-Oficejoj). — 3 h., 4<sup>a</sup> Labora kunveno (pri Junula fako). Vespere: Mitingo kaj paroladoj.

*Dimanĉon 31.* — Komuna ekskurso al la reĝaj kasteloj de Neuschwanstein kun komuna manĝo.

*Lundon 1<sup>a</sup> Augusto.* — 9 h. 1/2, 5<sup>a</sup> Labora kunveno (pri komerca fako). — 3 h., 6<sup>a</sup> Labora kunveno (pri komerca fako). — 5 h. 1/2, Malfermo de la Kongreso de TEKA. — 8 h. 1/2, Granda Vesperfesto.

*Mardon 2.* — 9 h. 1/2, 7<sup>a</sup> Labora kunveno (pri turisma fako). — 3 h., Ferma kunveno; alprenado de la deziresprimoj. — 5 h. 1/2, kunveno de TEKA. — 7 h., Granda komuna festeno.

*Merkredon 3.* — Kunvenoj de TEKA kaj diversaj Esperantiaj Asocioj kaj Entreprenoj. — Ekzamenoj de la Instituto de Esperanto.

*Ĵaŭdon 4, Vendredon 5, Sabaton 6.* — Vizito de Munĥeno.

*Dimanĉon 7.* — Vizito al la prezentado de Oberammergau ka eventuale ekskurso al Bavariaj Alpoj.

\*  
\* \*  
\*

KUNVENOJ. — La Kunvenoj okazos en la belega hotelo 3. Mohren. La *detala* tagordo de tiuj kunvenoj aperos en «Esperanto» kaj estos sendata al ĉiuj kongresanoj.

LOGADO. — Estos eldonataj 3 klasoj de kuponaroj. En ĉiu kuponaro estas entenataj 6 noktoj, kun frua matenmanĝo, tag-kaj vespermanĝoj dum la tuta kongreso kaj ekskurso al Neuschwanstein (kun

vagonaro, vizitado de la reĝaj kasteloj kaj manĝoj). La fruaj matenmanĝoj okazos en la hoteloj; la festenoj en la hotelo 3. Mohren, kaj la komunaj ĉiutagaj tag. kaj vespermanĝoj en bierhalo. La diferenco de prezo inter la tri klasoj estas kaŭzata de la diverseco de la ĉambroj; la manĝoj kostos saman prezon por ĉiuj kongresanoj. Oni rimarku, ke la kosto de la ekskurso (10 Sm) estas entenata en la kuponaro.

VOJAĜOJ. — Jen la kosto de la vojaĝo Augsburgon de kelkaj urboj:

*Basel*, II<sup>a</sup> klaso Sm 12,60, III<sup>a</sup> klaso Sm 8,20; *Genevo*, II<sup>a</sup> 17,85, III<sup>a</sup> 12,15; *Marseille*, II<sup>a</sup> Sm 32,95, III<sup>a</sup> 16; *Milano*, II<sup>a</sup> 23,30, III<sup>a</sup> 14,10; *Genova*, II<sup>a</sup> 25,10, III<sup>a</sup> 16,95; *Nancy*, II<sup>a</sup> 14, III<sup>a</sup> 9; *Parizo*, II<sup>a</sup> 24, III<sup>a</sup> 16,05; *Bruselo*, II<sup>a</sup> 21,25, III<sup>a</sup> 13,40; *London*, II<sup>a</sup> 34,35; *Rotterdam*, II<sup>a</sup> 22, III<sup>a</sup> 14,25; *Hamburg*, II<sup>a</sup> 17,85, III<sup>a</sup> 11,60; *Breslau*, II<sup>a</sup> 18,75, III<sup>a</sup> 12,20; *Praha*, II<sup>a</sup> 13,20, III<sup>a</sup> 7,70; *Wien*, II<sup>a</sup> 15,85, II<sup>a</sup> 9; *Budapest*, II<sup>a</sup> 24,45, III<sup>a</sup> 12,75; *Firenze*, II<sup>a</sup> 25,90; III<sup>a</sup> 16,20.

Por ricevi la prezojn de *iro* kaj *reiro* oni duobligu la suprajn prezojn.

La personoj, kiuj dezirus uzi rondvojaĝan bileton, trovos la necesajn informojn ĉe la stacidomoj de la ĉejaj urboj.

KONGRESKARTOJ. — La Kongreskarto kostas 3 Sm. Ĝi rajtigas al ĉeestado je ĉiuj kunvenoj kaj senpaga ricevado de la dokumentoj; ĝi estas necesega por la ricevo de la kuponaro.

Karto de helpkongresano kostas 1 Sm; ĝi rajtigas je senpaga ricevado de la dokumentoj; ĝi estas difinita por la personoj, kiuj ne veturas al la Kongreso. Helpkongresanoj povas ĉiam fariĝi kongresanoj, pagante 2 Sm pluajn.



## ENLANDA MOVADO

### BARCELONA

Ekskursoj—La 8 an de Majo, la societo «Espero Kataluna» organizis ekskurson al Rabassalet, bela fonto kiu estas sur nia najbara monto Tibidabo.

La geekskursanoj, ĉirkaŭ 20, kunvenis en la malsupra placo de la funikulara stacidomo, kaj sin direktis al la loko sur kies supraĵo staris esperanta flago.

La ekskurso plene sukcesis malgraŭ dum ĝi la vetero malboniĝis kaj ne estis eble manĝi en la arbaro kiel oni intencis. Por reiri al la funikulara vagonaro ili estis devigataj atendi la finon de la pluvado, kiu vespere, je la 5.<sup>a</sup>, falis de la

jam de longe minacantoj nuboj, sed la ekskursanoj revenis Barcelonon tute kontentigitaj pro la tago pasigita sur la montoj.

La sama societo la 22 an de Majo vizitis la ŝipon «Cocodrilo'n» en kiu estas la «Comisión Oceanográfica». Kelkaj oficiroj de la ŝipo afable montris al gevizitintoj la interesajn fiŝojn kiujn la muzeo kaj akvario enhavas.

La vizitintoj iris kaj revenis de la ŝipo per la vaporŝipetoj «Golondrino» kies mastro metis je ilia dispono.

La 11 an de Junio la grupo «Barcelona Stelo» vizitis la «Observatori Fabra». En tiu ĉi ekskurso partoprenis multaj esperantistoj kiuj ne bedaŭris malprofiti la noktan ripozon por sin instrui per Esperanto, kaj samtempe disvastigi ĝin.

La «Komerca Fako» de «C. A. de D. del C. y la I.» okazigis la 7 an de Junio, sian ordinaran kunvenon por elekti la novan Komitaton por la jaro 1910—11<sup>a</sup> kaj unuanime estis elektita de la ĉeestantoj Sroj. D. Dalmau, *Prezidanto*; J. Mussons, *Vic-Prezidanto*; J. Bubé, *Sekretario*; A. Massana, *Vic-sekretario*; F. Casademont, *Bibliotekisto*.

Dum la kunsido oni ankaŭ legis raporton pri la agado de la antaŭa Komitato, kaj fine oni aprobis proponon por pli oportuna agado, kaj atingis de sinjoro Dalmau ke li faros esperantan kurson dum la nuna somero.

En la societo «La Familiar Obrera de Sans» okazis grava konferenco pri Esperanto, organizita de la grupo «Forigu Barojn» en kiu partoprenis niaj amikoj Sroj. D. Dalmau, M. Jordi, Dro. J. Bremon—prezidanto de «K. E. F.»—kaj Navarro, laŭdante ĉiuj nian karan lingvon kaj vekante la entuziasmon de la ĉeestantaro.

La kurso kiun oni malfermis, en la sama societo estas tre ĉeestata de la loĝantoj el la antaŭurbo Sans, kiuj tre avide sekvas nian movadon.

Ni ankaŭ devas sciigi al la gelegantoj de K. E. la edziĝon de nia samideano Sro. Salvatore Casanovas kun Fino. Tereso Comas. Al ili ni deziras la plej longan vivadon kaj feliĉecon.

## GIRONA

La Komitato de «K. E. F.» plej atente petis min plenumi la taskon kiel delegito en la ĉi tiea urbo. Tion ekentreprenante mi sendas al la organizintoj de tia vasta rondo miajn gratulojn, kaj samideanajn salutojn al ĉiuj samcelanoj en ĝi partoformantaj.

La esperantista movado en Girona multe sveniĝis, sendube pro la etaj malkonsentoj ekzistantaj—bedaŭrinde—inter la estraranoj de la du grupoj «Amo kaj Espero» kaj «Gerona Esperantistaro», kaj laŭ mia aparta vidmaniero, estos tute efika kunigi ambaŭ societojn je unu sola sub nova nomo kaj nova estraro, ĝin konsiderante kiel novnaskiĝintan grupon: kaj tiam per volo kaj entuziasmo, kiuj ja ne mankas ĉe neniu gerona esperantisto, oni prosperos kaj atingos

disvolvigi nian internacian lingvon, unuigante de post la unua momento la samlandanojn por baldaŭ poste unuigi la alilandanojn.

—Oni organizas provincan esperantistan kongreson, pri kies sukceso klopodas la anoj de la organiza komitato. Ni scias ke ĉiuj samideanoj de la ĉirkaŭaj vilagoj intencas kunhelpi tiun ĉi kongreseton per ilia klopodo kaj alesto.

Pliajn detalojn mi ne povas liveri al la legontoj ĝis venontaj raportoj. — LA DELEGITO.

#### TARRAGONA

Jene estas la nova Komitato de la grupo «Tarragona Esperanta» elektita por la nuna jaro.

*Honora Prezidanto* Dro. Zamenhof; *Prezidanto* Sro. Joan Molas Sabaté; *Vic-Prezidanto*, Sro. J. Vidal Ras; *Sekretario*, Sro. D. Roig Cubells; *Vic-Sekretario*, Sro. Francesc Menaranch; *Kasisto* Sro. Joan Llagostera; *Kalkulisto*, Sro. Pau Olivé Sanromà; *Bibliotekisto*; Sro. Joan Solé Granell.

La sciigon pri la okazo de la «Dua Kongreso de Katalunaj Esperantistoj» en nia urbo, gaje kaj ĝoje akceptis ĉiuj Tarragonanoj kaj oni sin promesis ĝin kunhelpi per ĉies fortoj.

Danko al la okazonta Kongreso ree naskiĝis en tiu ĉi urbo la fervoro por nia internacia lingvo. Novan kurson por virinoj estas ekkomencita en ĉi tiu monto, al kiu alestos la fraŭlinoj multenombre. Ĝi estos instruita de Sro. Joan Molas.

En la 26<sup>a</sup> Junio okazis ekskurso al «Poblet», en kiu partoprenis ĉiuj katalunaj societoj por ekskurso, organizita de la «Centre Excursionista de Catalunya».

Nia grupo delegis Sron. Molas por reprezenti ĝin en la ekskurso, kaj nia samideano Sro. Solé Granell, estis deligita de la «Centre Excursionista de Tarragona». — LA DELEGITO

#### BARBARA DEL VALLES

La 12 an Junion okazis en ĉi tiu vilaĝeto la ĉiujara festo de la grupo «Esperanta Nesto».

Je la naŭa kaj duono matene ĉiuj grupanoj kunvenintaj en la societa sidejo, aliris kun la standardo al la vilaĝa preĝejo, kie Pastro diris solenan meson. Pastro Cardona diris longan predikon pri Esperanto.

En la komenco kaj fino de la meso, la esperantistoj kantis *Ave-Mario'n*, kaj kiam oni forkunportis la standardon, Sro. Puigbonet ludis fortepiane la *Esperantan Himnon*.

Posttagmeze je la 4 kaj 1/2 ekkomenciĝis Esperanta Festo. La ĉestantaro estis cirkaŭ 200. Prezidis Sroj. Prezidanto, Vic-Prezidanto kaj Sekretario de la grupo. Dekstre de la prezidantecloko sidis sinjoroj la vilaĝestro, juĝestro kaj ceteraj aŭtoritatoj; maldekstre estis geanoj kaj protektantoj de nia «Nesto». La prezidanto Pastro Sro. Jozefo Planas, malfermis la feston, kaj baldaŭ poste sinjoro Puigbonet diris longan paroladon. Ankaŭ paroladis Sro. Joan Arnella.

Ankaŭ partoprenis en la festo gefraŭloj el la grupo legante poeziojn kaj poemojn.

En la fino, nia kara Prezidanto faris belan kaj konvinkigan paroladon, kiu multe plaĉis al ĉiuj ĉeestantoj, kaj li meritas nian gratulon pro tio, ke per ĝi li sukcesis pligrandigi nian «Neston», kaj kontentigi ĉiujn. — LA DELEGITO.

## SABADELL

Kun malĝojo hodiaŭ mi devas raporti pri la morto de du el niaj pli malnovaj sindonemaj kaj entuziasmaj amikoj: Sro. J. Camps kaj J. Sanllehí.

La unua, ankoraŭ Esperanto ne estis disvastigata en nia urbo kiel nun, kiam li proponis en laborista kongreso kiu okazis en Sabadell dum la jaro 1904<sup>a</sup> ke ĝi akceptus kiel internacian lingvon, Esperanton, por la rilatoj kun eksterlandaj laboristaj societoj, propono kiu estis aprobata de ĉiuj, kaj ĝis nun li ĉiam estis apud ni batalante por nia lingvo, ĉu kiel ano de «Esperanta Semo» ĉu de «K. E. F.» laborante private por alvarbi novajn batalantojn.

Al lia vidvino kaj filoj, niajn plej sincerajn kondolecojn.

Sro. J. Sanllehí, estis alvarbita al nia movado de la jaro 1906<sup>a</sup> kaj li estis ano de Aplech «Esperanta Grupo» kaj ankaŭ de «Esperanta Semo» ĝis lia forvojaĝo al Buenos Aires, kie la morto surprizis lin je la dudek tria jaraĝo, Li estis ĉiam entuziasma propagandisto de nia lingvo.

Al lia patrino kaj frato, ni petas bonvolu ricevi niajn kondolencojn. — LA DELEGITO.

## OLOT

Kia ĝojo, karaj gelegantoj, kiam iun tagon post noktomanĝi estante ni ĉe nia esperanta lernejo frapis la pordon hotelservisto portante leteron esperante skribitan!

Gaja surprizo! Sro. D. Serdá, Direktoro de nia amegata gazeto, ĵus alveninta ĉi tien!

Kompreneble, ĉiuj federaciaj pretiĝas manpremi kaj saluti lin, kiu post la vizito de tri ĉi tieaj samideanoj aliris al la sidejo de «Olot Stelo».

Tuj kiam li eniris en la sidejo, komencis paroli esperante dum du senĉesaj horoj, ĉarmante ĉiujn la facilmaniero paroli nia lingvo.

Same li faris la duan tagon montrante al ĉiu, ke li estas inda je la rolo kiun al li komisiis «K. E. F.»

Ni volonte estus aŭskultinte konferencon pri Esperanto sed bedaŭrinde ne okazis tion pro sia sano.

Lia restado ĉe ni dum tri tagoj plivekiĝis entuziasmon por nia lingvo. — LA DELEGITO.



## OFICIALA PARTO

El Comitè Directiu de «K. E. F.» ha rebut un atent comunicat de l'Excma. Diputació de Tarragona en resposta a la comunicació que's féu a dita corporació de que'l segon Congrés de «K. E. F.» tindrà lloc en aquella ciutat. En ell se'n ofereix tot l'apoi necessari per a portar a bon terme el nostre Congrés.

No es, doncs, d'extranyar que desde ara s'auguri un exit.

Repetidament alguns senyors socis se queixen de que no reben la revista; i, com sigui que l'Administració expedeix tots els exemplars necessaris, prega als que's trobin en aquest cas que facin el favor de reclamar el número al repartidor de la correspondència, i en tot cas donar-ne avís an aquesta Administració, per postal, a fi de posar-hi'l correctiu corresponent.

Si algun senyor soci's troba en el cas de que li falta algun número de «K. E.», pot enviar nota, que seguidament se li enviarà, puix l'Administració sols desitja que tothom estigui ben servit.

L'Administració prega a tots els senyors delegats de «K. E. F.» i particulars que han de saldar comptes amb ella, que ho facin a la major brevetat, puix resulta que la marxa administrativa sempre es millor tenir-la en bon ordre que no pas en desordre, i an això hi han d'ajudar no solament l'administrador, sinó també en primer lloc els delegats, i en segon els particulars, car l'obra de «K. E. F.» es de tots, i tots hem de contrubuir-hi.

En un dels nostres proxims números publicarem, en aquesta mateixa secció, un detallat estat de comptes pera que'ls nostres amics puguin veure l'estat satisfactori de «K. E. F.» i per això es que fem el prec de més amunt.



## KORESPONDADO

Sro. A. Melis, Fino. U. U. Viaj manuskriptoj aperos baldaŭe. — Sro. R. M. Via tradukita verso sendube estas vere interesinda kiel kanzono, sed ne kiel verso. — Sro. J. V. Verki originale ne estas je via atingo; pro tio viaj prozaĵoj ne taŭgas. Rilate al viaj versoj, ni ne povas ilin publikigi, tial, ke ni nur enpresigos *poeziojn*, sed ne versojn. — Federaciano: Ni diras al vi tion, kion ni diras al Sro. I. V.

*Avizoj.* — Denove ni petas al niaj afablaj kunlaborantoj, skribi plej legeble siajn al ni alsenditajn manuskriptojn. Manuskriptojn ne plenumante tian kon diĉon ni eĉ ne legos.

Kiam oni skribu al tiu ĉi Redakcio, ĝin faru poŝtkarte.

Manuskriptojn alsendotajn al ni, afranku laŭ tarifo «original pera impremta.»